NOTIZIARIO IN LINGUA ESPERANTO. N° 138

Roma, la 10.an de junio 1940°/XVIII

Politika semajno 4°-10° junio 1940°/XVIII

Hodiaŭ, je la 16° kaj 30, la Ministro por Eksteraj Aferoj, Grafo Ciano, akceptis en Palaco Chigi la Ambasadoron de Francujo, kaj faris al li la jenan komunikon:

"Lia Majesto la Reĝo Imperiestro deklaras, ke Italujo konsideras sin en militstato kontraŭ Francujo komencante de morgaŭ, 11° de junio".

Je la 16° kaj 45 Grafo Ciano akceptis la Ambasadoron de Granda Britujo kaj komunikis al li per identaj vortoj, ke Italujo konsideras sin en militstato kontraŭ Granda Britujo.

Hodiaŭ je la 18° el la balkono de Palaco Venezia la Duce eldiris la jenon paroladon:

"Militantoj surtere, surmare kaj en la aero, Nigraj Ĉemizuloj de la Revolucio kaj de la Legioj! Viroj kaj virinoj de Italujo, de la Imperio kaj de la Regno de Albanio! Aŭskultu!

Horo signita de la destino batas en la ĉielo de nia Patrujo, la horo de la neŝanĝeblaj decidoj.

La militdeklaro estas jam transdonita al la Ambasadoroj de Granda Britujo kaj de Francujo.

Ni eniras sur la kampon kontraŭ la demokratioj plutokrataj kaj reakciaj de Okcidento, kiuj en ĉiuj tempoj malhelpis la iradon kaj ofte insidis la ekziston mem de la itala popolo.

Iuj jarkvinoj de la plej lasta historio povas resumiĝi per ĉi tiuj vortoj: frazoj, promesoj, minacoj, ĉantaĝoj kaj je la fino, kiel kronado de la konstruaĵo, la malnobla siego de 52 Ŝtatoj.

Nia konscienco estas absolute trankvila. Kun vi la tuta mondo estas atestanto, ke Italujo de la Liktorjo faris ĉion, kio estis home ebla por eviti la ŝtormon, kiu skuas Eŭropon. Sed ĉio estis vana. Sufiĉis revidi la traktatojn por adapti ilin al la ŝanĝemaj postuloj de la vivo de la Nacioj kaj ne konsideri ilin netuŝeblaj por la eterneco; sufiĉis ne komenci la stultan politikon de la garantioj, kiu montriĝis precipe mortiga por tiuj, kiuj ilin akcepetis. Sufiĉis ne malakcepti la proponojn, kiujn la Führer faris la 6.an de oktobro de la pasinta jaro, post la fino de la milito en Polujo. Jam ĉio tio apartenas al la pasinteco. Se hodiaŭ ni estas pretaj por alfronti la riskojn kaj la oferojn de la milito, estas pro tio, ke la honoro, la interesoj, la estonteco fere tion trudas, ĉar granda popolo estas vere tia, se ĝi konsideras sanktaj siajn sindevigojn kaj se ĝi ne evitas la superajn provojn, kiuj determinas la iradon de la historio.

Ni enmanigas la armilojn por solvi, post la solvita problemo de niaj kontinentaj landlimoj, la problemon de niaj maraj landlimoj. Ni volas dis-

rompi la katenojn je karaktero teritoria kaj militista, kiuj sufokas nin en nia maro, ĉar popolo de 45 milionoj da homoj ne estas vere libera se ĝi ne havas liberan vojon al la Oceano.

Ĉi tiu giganta batalo estas nur unu fazo kaj la logika disvolviĝo de nia Revolucio. Ĝi estas la lukto de la popoloj malriĉaj kaj kun multenombraj brakoj, kontraŭ la malsatigistoj, kiuj ~~kaxkx~~ kruele tenas la monopolon de ĉiuj riĉaĵoj kaj de la tuta oro de la tero; ĝi estas la lukto de la popoloj fekundaj kaj junaj kontraŭ la popoloj malfekundiĝintaj kaj turniĝantaj al la pereo; ĝi estas la lukto inter du jarcentoj kaj du ideoj.

Nun, kiam la kuboj estas ĵetitaj kaj nia volo bruligis malantaŭ ni la ŝipojn, mi solene deklaras, ke Italujo ne intencas treni ~~xixxjnxxxpxkajn~~ en la konflikton aliajn popolojn al si najbarajn per maro aŭ per tero.

Svislando, Jugoslavujo, Grekujo, Turkujo kaj Egiptujo bone notu ĉi tiujn miajn vortojn. Dependas de ili, nur de ili, ĉu tiuj vortoj estos rigore konfirmitaj.

Italoj, en memorinda kunveno, tiu de Berlino, mi diris, ke, laŭ la leĝoj de la faŝista moralo, kiam oni havas amikon oni iras kun li ĝis la fino. Tion ni faris kaj ni faros: kun Germanujo, kun ĝia popolo, kun ĝiaj venkantaj armitaj fortoj.

En ĉi tiu antaŭtago de okazaĵo je jarcenta graveco ni turnu nian penson al la Majesto de la Reĝo Imperiestro, kiu, kiel ĉiam, interpretis la animon de la Patrujo, kaj ni salutu voĉe la Führer, la Estron de ~~kx~~ granda Germanujo aliancano.

Italujo proletaria kaj faŝista estas trifoje staranta, forta, fiera kaj kompakta kiel neniam.

La signaldiro estas unu sola, kategoria kaj memdeviga porĉiuj, ĝi jam transflugas kaj ardigas la korojn de la Alpoj ĝis la Hinda Oceano: venki!
Kaj mi venkos por fine doni longan periodon de paco kun justeco al Italujo, al Eŭropo, al la mondo.

Itala popolo: kuru al la armiloj kaj pruvu vian persistemon, vian kuraĝon, vian bravecon!"

Hodiaŭ la itala Ministerio por la Milito, ordonis la partan mallumigon de la tuta lando por la kontraŭaera protekto, komencante de hodiaŭ vespere.

Kaj hodiaŭ la itala maristaro celebris per solenaj manifestadoj kaj per fieraj militaj ritoj sian tagon. Kaj en la maristaj celebradoj partoprenis la italaj popolamasoj, ĉar ili sentas, ke unu el la esencaj aspektoj de la nova destino, kiun estas forĝanta al si Italujo estos modlitaj sur la maro fare de ĝiaj potencaj ŝipoj, de ĝiaj rapidegaj Mas, de ĝiaj tre aŭdacaj submarboatoj.

En ĉi tiu horo, al la ardo de la itala popolo respondas la fideleco de la gentoj de Libio kaj de la Imperio kaj la kompleta aliĝo de la albana popolo.

En Tirana dum impona revuo de la albanaj junulaj fortoj, hieraŭ, estas

turnitaj ardaj manifestacioj al Italujo kaj estas ripetita la krio, ke la albanoj estas pretaj por ĉiu ajn okazaĵo.

En Tripoli, la tuta musulmana popolamaso, akompanata de la Ulema, kunvenis hieraŭ vespere en Placo Italia por arda manifestacio de italeco. La Kadì de Tripoli, turniĝinta al Marŝalo Balbo, legis paroladon, en kiu, inter alie, estas dirite, ke la libiaj musulmanoj estas fieraj marŝi al la fatala destino de grandeco de Faŝista Italujo.

La antaŭeniro en Francujo de la kolonoj de la Reich daŭras nekontraŭstarebla kaj venka.

El la hodiaŭa komuniko rezultas: sur fronto dexproksimume 300 kilometroj da larĝo la germanaj operacioj, direktitaj al ~~ix~~ malsupra Seine kaj al Marne kaj Champagne, daŭras laŭ la antaŭfiksitaj planoj. Grandaj sukcesoj estas atingitaj. Sukcesoj eĉ pli grandaj sekvos. Ĉiuj malamikaj kontraŭatakoj, eĉ tiuj faritaj per tankoj, fiaskis. En pluraj punktoj la batalo havas karakteron de rapida postkuro. Gravaj formacioj de aeroplanoj apogis la antaŭeniron de la armeo; krome, en la regiono de Reims, ili atakis Stabejojn, koncentriĝojn de trupoj, bateriojn kaj marŝantajn kolonojn. Super malsupra Seine la germana aviado atakis fervojajn retojn, staciojn kaj kolonojn de malamikaj trupoj retiriĝantaj. La havenoj de Cherbourg kaj de Le Havre estas bombarditaj. La malamika aviadistaro perdis hieraŭ 91 aeroplanojn. Estas alfunditigitaj pluraj malamikaj ŝipoj.

La sukcesoj de la germanaj armeoj estas implicite rekonitaj de la franca komuniko, kiu hodiaŭ enhavas nur la jenajn vortojn: "De la maro ĝis la Argonnes la batalo daŭras ĉ am pli intensa". Ili estas rekonitaj ankaŭ de nova proklamo direktata de ĉefgeneralo Weygand al la militantaj trupoj, en kiu estas dirite, ke: "la germana ofensivo senbridiĝis jam sur la tuta fronto de la maro ĝis Montmedy kaj etendiĝos ĝis Svisujo. Ni estas, finiĝas la proklamo de Weygand , je la lasta horkvarono".

Kaj ke la horo de Parizo jam sonoris estas implicite rekonite de la parizaj ĵurnaloj, kiuj hodiaŭ informas siajn legantojn, ke ili translokiĝos en la provincon kun la espero daŭrigi tie la eldonon. Forlasante Parizon, la ĵurnalo "Epoque" faras l stan pentoaĵon, ĝi sendas la krion, longtempe sufokitan, de la vero, skribante: "Francujo pagas hodiaŭ siajn stultaĵojn, siajn forgesojn, siajn erarojn, siajn kulpojn. Ĝi pagas - daŭrigas la "Epoque" - pro la mezboneco de siaj politikaj viroj, kiuj mensogis al ĝi; ĝi pagas ankaŭ pro la senkapableco de superpasita reĝimo politika-anarkia. Fine ĝi pagas pro la forlaso de parto de siaj regantaj klasoj, kiuj estis perdintaj la senton de siaj respondecoj".

Tiu akuzo de "Epoque" estas senkompata sed prava. Kaj ĝi estas direktata ne nur al la politikaj viroj de Francujo sed ankaŭ al tiuj politikaj de Anglujo. Sur la unujn kaj sur la aliajn falas hodiaŭ nova kulpo: tiu de la perfido kaj de la forlaso ankaŭ de la la lasta peco de Norvegujo, Narvik, kaj de la Reĝo de Norvegujo, Haakon, kiu antaŭe estas trompita per la promesoj de helpoj kaj devigita akcepti militon malfacilan kaj senesperan, kaj hodiaŭ estas devigita forlasi Norvegujon por iri ankaŭ li al la tombejo de la senregnaj Reĝoj kaj Registaroj, nome al Londono.